

29a jarkolekto - decembro 2008/12

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

**Ĉu oni timu
inflacion?**

**Tabako
ankoraŭ ne tabua**

**La nuna monda
financa krizo**



Baldaŭ komenciĝas la 30a eldonjaro de MONATO.

Por festi tion, MONATO havigos aron da avantaĝoj al siaj abonantoj.

Do rapide repagu vian kotizon, ĉar specialaj ofertoj en la jaro 2009 havigos al vi eblecon por regajni eĉ pli ol la tutan kotizon. Por ke vi certe ne maltrafu tion, vi trovas ĉi sube jam unuan avantaĝon: 20%-a rabato por la ĉi-sekvaj libroj! Se vi mendas la tutan kolekton vi jam realigas ŝparon de 15,60 eŭroj!

- | | | |
|--|------------------|---------|
| • La asocio | 24,00 | 19,20 € |
| (baldaŭ aperos, sed jam nun antaŭmendu/ priskribo ĉi-sube) | | |
| • Dormanta Hejmaro | 16,00 | 12,80 € |
| • Sur Parnaso | 12,00 | 9,60 € |
| • Mortiga ekskurso | 10,00 | 8,00 € |
| • Aventuroj de Pinokjo | 10,00 | 8,00 € |
| • Nigra Magio | 6,00 | 4,80 € |

Tiu ĉi oferto validas ĝis 2008/12/31 por MONATO-abonantoj, kiuj mencias tiun ĉi anoncon en sia mendo. Al la menciitaj prezoj aldoniĝos la reala afranko, kun minimumo de 3 eŭroj.



La Asocio

Finfine firmfundamenta historio!

Doktoro Ziko Van Dijk pretigis Esperantan libron, 304-paĝan. Ĝi ne estas “plena historio de Esperanto”, sed tamen de la plej grava parto de ĝi, nome la historio, sub la ombrelo de UEA. Kaj nepre estas vere la unua nia historio, kiu havas firman sciencan bazon. Ziko funde esploris ĉiujn gravajn dokumentojn en la Centra Oficejo, kaj ne nur tiujn dokumentojn, sed ankaŭ multajn kiujn li ricevis de aliaj instancoj. Granda avantaĝo estas ke en multaj “historietoj” ambaŭ partioj povis konigi siajn argumentojn, kiuj ofte ne estas troveblaj en nia gazetaro! Ĉe konfliktoj en nia asocio ja tre ofte okazas ke unu en la koncernataj partioj estas buŝumita, pro manko de diskoniga organo!

Kiu volas paroli pri Esperanto-historio, kaj ne nur klaĉi “el la nuko”, nepre bezonas seriozan studadon de tiu ĉi monumenta verko.

(pds)

Vundita lando

La korea milito komenciĝis en 1950 kaj daŭris tri jarojn. Armistico estis subskribita. Pacotraktato ankoraŭ ne venis. Ĉu ni diru, ke la tuta lando atendas ĝin? Eble ne, ĉar okaze ke tia oficiala paŝo estus farita, la nuntempe videbla limo estus firmigita, kaj tion koreoj ne volas. Multaj sud-koreoj deziras reunuiĝon, tion montras la paperetoj, kiuj troviĝas ĉe la muro en la stacidomo de Imjingang [imĝingan]. Kion deziras la nord-koreoj? Oni ne povas scii ...



10

La nuna monda financa krizo



15

Jam plurfoje la mondo travivis financon krizon. La plej konata estas tiu de 1929, kiun sekvis granda depresio. Ankaŭ nun la mondon trafulas tia krizo. Ĝi malsimilas pro siaj kaŭzoj, pro la ĝenerala ekonomia situacio kaj pro la rimedoj solvi ĝin.

Ohiaj ŝtataj Hipokaŝtanoj

La interkolegiaj sportaj ludantoj kaj teamoj de Ohia Ŝtata Universitato (OŜU) estas nomataj Buckeye [bakaj], laŭ la ŝtata arbo, la amerika hipokaŝtano, kaj ili partoprenas en la parto 1 de la Nacia Kolegia Atleta Asocio en ĉiuj sportoj kaj la Konferenco de la Granda Deko en la plimulto de la sportoj.



26

politiko

LITOVIO	8
Ek al profesia armeo	
ALBANIO	9
Azilo – eskapilo	
JAPANIO	9
Elitulo elektita	
HUNGARIO	9
Referendumo malsaniga	
KOREIO	10
Vundita lando	
MULTKULTURECO.....	12
Urbestro-protesto	

moderna vivo

LITOVIO.....	13
Jarmila odiseado	
KLERIGADO	13
Statistikoj studindaj	
JURO	13
En Interretan, en la karceron	
JAPANIO	14
Tabako ankoraŭ ne tabua	

ekonomio

BANKOJ	15
La nuna monda financa krizo	
LITOVIO.....	18
Ĉu oni timu inflacion?	

turismo

MONTENEGRO	19
Vidinda ponto	
VOJAĜGVIDILOJ	19
„Antverpeno inter la pintaj 10 urboj”	

spirita vivo

PILGRIMEJOJ	20
„Dia Filo estu glorata dum jarcentoj”	
HISTORIO	21
Oni rehabilitu papon Pion la dek-duan!	

arto

KONKURSOJ	22
Arta futuro	

libroj

Kvazaŭaŭtobiografia rakonto tre maltrankviliga	23
Bizara rakonto fantazia	24

medio

AŬSTRIO	25
Temperaturleviĝo en Tirolo	
RECIKLIGO	25
Belgio pintas	

sporto

USONO	26
Ohiaj ŝtataj Hipokaŝtanoj	

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj.....	6
› El mia vidpunkto.....	7
› Anoncetoj.....	27

kiel pagi vian abonon de monato?

► Rekto al la eldonejo ...

> Per via FEL-konto.
 > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
 > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
 > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
 > El Usono por ordinara usona ĉeko.
 > Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
 > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
 > Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
 > Per bankĉeko tratisa je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	24	27	14,4	5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	24	27	14,4	5	9
Britio	GBP	39	42	23,4	4	7
Bulgario	EUR	26	29	15,6	5	9
Ĉeĥio	EUR	34	37	20,4	5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	40	70
Estonio	EUR	26	29	15,6	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	46	50	27,6	5	9
Grekio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hispanio	EUR	46	50	27,6	5	9
Honkongo	EUR	42	45	25,2	5	9
Hungario	HUF	6950	7750	4170	1340	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	42	45	25,2	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1460
Kanado	CAD	76	80	45,6	9	15
Kipro	EUR	34	37	20,4	5	9
Koreio	EUR	42	45	25,2	5	9
Kostariko	EUR	24	27	14,4	5	9
Kroatio	EUR	26	29	15,6	5	9
Latvio	EUR	26	29	15,6	5	9
Litovio	EUR	26	29	15,6	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	34	37	20,4	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	398	430	238,8	45	73
Nov-Zelando	NZD	105	110	63	11	19
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalio	EUR	42	45	25,2	5	9
Rusio	EUR	24	27	14,4	5	9
Singapuro	EUR	42	45	25,2	5	9
Slovakio	EUR	26	29	15,6	5	9
Slovenio	EUR	34	37	20,4	5	9
Sud-Afriko	EUR	42	45	25,2	5	9
Svedio	SEK	466	499	279,6	49	86
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Tajvano	EUR	42	45	25,2	5	9
Usono	USD	78	82	46,8	8	14
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

► aŭ pere de peranto ...

> **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
 > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
 > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
 > **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
 > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
 > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
 > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
 > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
 > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoffice@esperanto.fi.
 > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
 > **Germanaj:**
 > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 > Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de.
 > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
 > **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
 > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: novire-sp@eircom.net.
 > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
 > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
 > **Japania:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
 > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a

Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca
 > **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
 > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
 > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
 > **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
 > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
 > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
 > **Norvegia:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
 > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
 > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
 > **Ruslandaj:**
 > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu
 > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbecckford@telkomsa.net.
 > **Svedaj:**
 > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schledorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

30-jara



En 2009 nia gazeto atingos sian 30an jaron. Tiun ĉi jubileon ni ne festos tiom abunde kiom la 25an; 30 ne estas tiel „magia“ cifero kiel 25, laŭ ĝenerala opinio. Tamen, ke la revuo ĝisvivis ĝin, ja estas kialo por ĝoji. Kaj por demandi, ĉu ĝi multe ŝanĝiĝis de post la antaŭa jubileo. Dum diskutoj kun abonantoj mi pli kaj pli aŭdas plendojn, ke la enhava nivelo de nia magazino falis. Unu ekzemple diris: „Mi ne aĉetas ĝin por vidi multajn bildojn, sed por legi interesajn kaj inteligentajn artikolojn.“ Certe, daŭre aperas inteligentaj artikoloj, sed mi ne povas komplete refuti tian kritikon. Mi nur povas atentigi, ke falo de nivelo estas nun ĝenerala tendenco en ĵurnalismo kaj amaskomunikiloj, kiuj preferas liveri banalajn kaj distrajn enhavojn anstataŭ seriozajn al siaj klientoj, onidire, ĉar ili deziras tion. Tiun ĉi tendencon MONATO ne simple povas eviti. Tiun falon de nivelo ni ŝuldas precipe al komerca televido, kiu furoris dum la pasintaj jardekoj. Ties programojn ĵus eminenta germana literatur-kritikisto Reich Ranicki [rajĥ ranicki] karakterizis Dreck (= koto). Aliflanke – almenaŭ en Germanio – seriozaj tutlandaj

ĵurnaloj daŭre havas sian grandan abonantar-on, parte eĉ kreskantan. Tio ja kontestas la aserton, ke legantoj deziras nur distrion kaj amuzon. Ranicki, cetere, rikoltis multan laŭdon pro sia kritiko, el la publiko, sed ankaŭ multan mallaŭdon – el televido ...

En mia ĉefa artikolo okaze de la 25-jara jubileo mi fine starigis la demandon, ĉu eble la reto malutilos al presitaj komunikiloj, kaj skribis: „Neniu povas scii aŭ prognozi. Dependos precipe de legantoj kaj abonantoj, ĉu kaj kiom longe eltenos la revuo.“ Nu, ĝi ja eltenis pliajn 5 jarojn, kun sama konstanta eldonkvanto. Ŝajnas al mi, ke la reto ja por multaj estas grava, sed nur kiel kompletiga komunikilo. Tamen daŭre homoj preferas la multe pli praktikajn presitajn komunikilojn, almenaŭ ne volas rezigni pri ili. Nia magazino do daŭre havas sian ŝancon, kaj tial kun optimismo ni eniru nian 30an jaron, spite al la nova ekonomia krizo!

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 29a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendo ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

revizianto:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Shlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis-spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseo:** Sendu al la konkerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Clevelend Heights, OH 44118, Usono.
Telefono/faksilo (216) 297-0370.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprajinitate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-shi, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Ne katolikaj, sed kristanaj radikoj

La eseo Unueco kaj diverseco de Zlatko Tišljarić (MONATO 2008/8-9, p. 13) jen kaj jen faras impreson de troeco, kaj kiu tro pruvas, riskas nenion pruvi. Li skribas: „Ekzemple la egalrajteco de religioj (sekulareco) daŭre troviĝas en danĝero, ke la plej forta religio (ekzemple katolika) devigos aliajn certamaniere akcepti duagradan pozicion. La postuloj, ke en la EU-konstitucion oni enmetu specialan rolon de la katolika religio, montras tiun tendencon.”

Ĉu iuj oficiale postulis, ke tiu aberacio aperu en la EU-konstitucio? La postulintoj estas inteligentaj kaj kleraj! Kial pentri ilin tiel stultaj? Ili sugestis, oficiale al la kompilintoj, nur pri aludo, kune kun aliaj fontoj, al „kristanaj” radikoj, ne al „katolikaj”, pli precize al „hebrea-kristanaj” radikoj.

Ankaŭ la fina eseeta konkludo ne forigas ĉiujn dubojn. Dum fluas la pruvo, fakte, ke estas bezonata lingvo neŭtrala por Eŭropa Unio, oni tramenese ekserĉas tian lingvon. Kaj facile oni memoras, ke Esperanto en pli ol unu jarcento tiom pleniĝis je belaj kaj prerogativoj, kiuj faras ĝian „inter-nan ideon” io ... neneŭtrala. Tiuj ideoj tendencas al speciala hegemonio. Oni povas konsenti kun tiuj ideoj kaj idealoj, sed certe ili ne estas „neŭtraj”... Aŭ ĉu estas bezonata nova ideo de neŭtraleco?

Armando ZECCHIN
Italio

Israelo 60-jara (10)

Elkoran dankon al Josef Šemer pro lia letero en la oktobra numero de MONATO (2008/10, p. 6). Leginte tiun leteron, oni tute klare komprenas tion, kio okazas en Palestino.

Antikveco de (reala aŭ supozata) popolo tute ne gravas. La fakto, eble aŭ supozo, ke iu (reala aŭ supozata) popolo naskiĝis ĉe iu loko tute ne gravas. La koncepto „prapatroj” tute ne havas sencon, kiam oni parolas pri miloj da jaroj (pensu, ke la nombro de viaj prapatroj dum la lastaj tri mil jaroj estas grandega, do ĉiuj homoj senescepte kunhavas la samajn prapatrojn, kiel judoj tiel araboj!). 20a-jarcentaj

judoj ne „revenis” ien, ili simple foriris el iu loko kaj iris Palestinon. Sur tiu tero ja sidis araboj: se ne, de kie venas, do, tiuj miloj da rifuĝintoj senhejmaj? Ĉu ili falis el la ekstera spaco? Palestino ne estas „origina sankta patrujo” de iu, ĝi tutsimple estas loko, kien pluraj judoj venis, forpelis la lokan loĝantaron kaj konstruis novan ŝtaton.

La socio, lingvo, kulturo kaj ŝtato, kiuj nun regas Palestinon, ne estas la samaj socio, lingvo, kulturo aŭ ŝtato de viaj historioj, mitoj, revoj aŭ deziroj. Oni simple konstatu, ekzemple, ke la nuntempa hebrea lingvo estas artefarite revivigita kreitaĵo. Neniu judo en la mondo parolis la hebrea (same kiel neniu kristano nuntempa parolas la latinan!) antaŭ la kreo de via nova ŝtato. Kaj oni eĉ rajtas dubi, ĉu la hebrea estis historie pli taŭga elekto, ol, ekzemple, la aramea aŭ la judgermana (jida).

La fakto, ke Josef Šemer ege ofendiĝas pro la legado de tiuj simplaj memevidentaj asertoj, estas bona mezuro de ĝis kiu punkto la afero estas nesolvebla. Nur katastrofo povas solvi ĉi tiun problemon, same kiel nur fortranĉo povis malligi la gordian nodon. Kaj tiu katastrofo alvenos.

Krei la judan ŝtaton (ie ajn, des pli ĉe jam loĝata spaco kaj kontraŭ la volo de la loka loĝantaro) estis ege tragika eraro, per kiu kulminis la brita koloniado en tiu regiono.

David GALADÍ-ENRÍQUEZ
Hispanio

Kiuj sendependiĝu? (11)

La opinio de Zlatoje Martinov (MONATO 2008/6, p. 8), laŭ kiu Kosovo estas perdita por Serbio kaj oni devas akcepti tion pro estonteco kaj pro membriĝo en Eŭropa Unio, estas opinio de malmultaj serboj (ĉirkaŭ 6 %), kiuj subtenas la politikistojn de la Liberala Demokrata Partio. Do 94 % de la serboj neniam akceptos deŝiradon de Kosovo kaj Metohio el Serbio.

Zlatoje Martinov grave eraras, kiam hodiaŭ, en la 21a jarcento, li subtenas la politikon de milita invado por ŝanĝi ŝtatlimojn, kiuj apartenas al pasintaj sangaj jarcentoj. Li ankaŭ eraras, kiam li ripetas ĉiujn malverojn pri „militaj

krimoj kaj aliaj teruraĵoj” kontraŭ la albanoj. Ni, esperantistoj, devas subteni pacan kunvivadon laŭ la ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj devas kondamni eraran politikon, ĉar ĝi revenigus la homaron al sangaj jarcentoj.

Atanasije MARJANOVIĆ
Serbio

Ĵurnalistoj ne timigu

Timigado de la legantoj ja altigas la vendojn de gazetoj (Historia historio, MONATO 2008/10, p. 5), sed ŝajnas, ke anoncoj pri sukcesoj en kuracado, ekzemple de aidoso, kvazaŭ neniun interesas. Almenaŭ Esperanto-parolantoj povas informiĝi pri kuracmetodoj prisilentataj de la oficiala medicino danke al traduko de profesoro Jacques Roux el Strasburgo, kiu helpis al internacia diskonigado de la francilingva libro de profesorino doktorino Yvette Pares, gvidantino de la senegala tradicia hospitalo Keur Massar. La esperantlingva titolo estas: La afrika medicino, mirige efika. La legantoj konstatoj, ke la diskonigo de nekonstestablaj sukcesoj post kuracado per tradiciaj lokaj plantoj estas ege malfacila.

Edmond LAMALREV
Francio

Neniam subtaksu la nescion

„Kio estas la Vulgato,” diras Armando Zecchin en la oktobra numero de MONATO, p. 20, „malfacile troveblas homo, kiu tion ne scias.” Mi povas certigi lin – eĉ jurante je la Vulgato! –, ke ekster lia itala katolika medio tre facile kaj tre ofte troveblas homoj, kiuj tion ne scias. En mia hejmlando Grekio, kie religia instruado (laŭ ortodoksa doktrino, kompreneble) estas ankoraŭ nun deviga en la lernejoj, mi klare memoras jenan unusolan mencion en la oficialaj lernolibroj: „poste ekestis aliaj tradukoj de la Biblio, kiel Peŝitto, Itala kaj Vulgata” – kaj mi pretus veti, ke al la granda plimulto de la grekoj, eĉ finstudintaj gimnazion (pri la aliaj ni eĉ ne parolu), Vulgato estas same nekonata kiel Peŝitto. Neniam subtaksu la nescion de la vasta publiko!

Angelos TSIRIMOKOS
Bruselo

Du mil ok

de Stefan MAUL

Ĉar mi estas nek kapitalisto nek borsojonglisto, la nuna tutmond(iĝ)a financ-krizo elirinta de Usono nek tuŝis nek fuŝis mian vivon. Do mi ne malgajnis, sed tre malgajis, kiam mi legis pri „mizeron suferantaj kreditoj“. Mi tre kompatis ilin kaj cerbumis, kiel helpi – eble per kolektado de almozoj? Sed poste mi legis, ke ili estas (en germana lingvo) ankaŭ „faule Kredite“, kaj tio trankviligis min; la germana vorto „faul“ [faŭl] nome signifas kaj „maldiligenta“ kaj „putra“. Mi decidis, ke tiuj kretenaj kreditoj estas maldiligentaj, do mem kulpas pri sia misa mizero, kaj tial mi ne helpu ilin.

Miliardulo kun propra ŝtato

Tian helpon ankaŭ ne bezonas itala riĉulo Silvio Berlusconi [berluskoni], kiu ĉi-jare furore revenis en la postenon de ĉefministro, ankaŭ danke al la fakto, ke en liaj manoj fakte troviĝas preskaŭ ĉiuj amaskomunikiloj de Italio. Tial itala verkisto Andrea de Carlo miradmire diris: „Ĉiu miliardulo povas akiri proprajn ŝipon kaj aviadilon, sed Berlusconi posedas propran ŝtaton!“ Tio signifas, ke Italio sekve de la financ-krizo ne, kiel ekzemple malvarma Islando, bankrotos, ĉar Berlusconi kompreneble faros ĉion por ne perdi sian karan posedaĵon. Feliĉaj varmlandaj italoj!

Truka justicofar(s)o

Tial al la rigora registaro en Romo ankaŭ ne minacas tia danĝero, kiun devis timi la turmentata turka registaro. La ĝenerala ŝtatprokuroro volis procesi kontraŭ la reganta partio AKP por malpermesi ĝin, kvankam ĝi venkis en demokratiaj elektoj kaj havas 340 el 550 mandatoj en la parlamento, do absolutan plimulton. La tuta moderna mondo ridis pri malmorder(n)a Turkio kaj ties real-satiro; pro tiu monda moko pri justicofar(s)o fine la juĝistoj decidis malpermesi ne la progresan partion sed la protestan proceson. Tamen: ĉu ne ankaŭ vi foje emus malpermesi vian registaron, kiam tuj post elektiĝo ĝi elegante forgesis ĉiujn pompajn promesojn donitajn antaŭbalote?

Se oni volus malice malpermesi la registaron en Kamboĝo, temus

pri amasproceso, ĉar ĝi ampleksas ne malpli ol 460 personojn: 1 ĉefministro, 9 vic-ĉefministroj, 16 ŝtatministroj, 34 kromministroj, 198 ŝtatestretarioj, 205 subŝtatestretarioj, sume do 460 registaranoj. Do preskaŭ popoldemokratio, se oni pripensas, ke ĉiu el tiuj registaranoj ja havas siajn asistantojn, sekretariojn, ŝoforojn, sekurec-gardistojn, tajpistojn, purigistojn, frizistojn, kuiristojn, servistojn ... sed Kamboĝo estas konstitucia monarkio kaj havas nur unu reĝon! Kio pri sub- kaj vic-reĝoj? Nu, „monarkio“ laŭ la helena deveno de la vorto signifas, ke nur unu persono regas. Domaĝe, Kamboĝo!

Sankta ebrio

Ho jes, kuriozaĵoj abundas en la mondo, ekzemple ankaŭ en Hungario. Tie por aŭtomobilistoj validas nul-promila alkohol-limigo. Sed katolikaj pastroj en meso trinkas vinon, jam de pli ol 2000 jaroj. Nun la hungaraj episkopoj avertis, ke pastro post tri mesoj povas atingi 0,2 promilojn en sia sango, sed por diservoj en diversaj lokoj bezonas aŭton. Se policisto kontrolas, la pastro perdas sian ŝofor-licencon. Kion fari? La problemon ja povus solvi koncerna direktivo de Vatikano, kiu permesas al pastroj, kiuj ne toleras alkoholon, nur leki la vinon aŭ uzi vinbersukon. Sed tio validas nur por medicina argumento. Pri aŭtotrafiko la papo nek pensis nek penis ... Ho sankta ebrio!

Tiajn alkoholproblemojn ne havas islama Afganio, ĉar tiu ĉi drogo estas malpermesita en la opioparadizo. Ĉar spite al bonegaj profitoj el opiovendado Afganio bezonas helpo, ankaŭ Germanio tie financas projektojn. Fiere do germana ministro pri eksterlandaj aferoj inaŭguris trinkakvosistemon en la urbo Herat kaj transdonis ĝin al afganoj. La renovigon de la antikva urbocentro li arbitre atribuis al germana help-agado. Krome li inaŭguris loĝistikolernejon de la afgana armeo en ĉefurbo Kabulo. Sed la trinkakvon en Herat jam de pli ol unu jaro administras afganoj, la urborenovigon ne financis Germanio sed la Aga-Khan-Fondaĵo, kaj la lernejon en Kabulo oni inaŭguris jam plurfoje ... Sed tion ja ne povis scii hejmaj germanoj, kiuj res-



STEFAN MAUL

pekte spektis koncernajn bildojn same fiere kiel la ministro.

Vizio kaj realo

Espereble la konstruaĵoj en Afganio eltenos tertremojn, precipe la lernejo. Ĉar lernejoj emas disfali pli facile ol aliaj domoj, almenaŭ en Ĉinio. Tion gepatroj en multaj urboj malespere spertis dum la terura tertremo en somero. Lernejoj preskaŭ ĉie tuj komplete detruigis, konstruaĵoj de komunista partio ĉie preskaŭ neniel difektigis. Mortis miloj da infanoj sed preskaŭ neniu partibonzo. Eble sankta Maŭ simple pli bone protektas siajn partianojn ol lernantojn, kiuj ankoraŭ ne estas stabilaj komunistoj.

Maŭ havis viziojn, kaj tiujn ofte havas ankaŭ nunaj politikistoj, ekzemple 16 potencaj registoj, kiuj dum G8-renkontiĝo (G8 = ok grandaj ŝtatoj) ĉisomere decidis pri oficiala vizio. Laŭ ĝi tutmonda emisio de klimat-detrua karbondioksido estos duonigita ĝis la jaro 2050 – do post 42 jaroj! Kiu en 2050 kontrolas, ĉu tiu ĉi vizio estas realigita? Same mi povus promesi, ke en 2050 ĉiuj homoj parolos Esperanton – ankaŭ bela vizio, ĉu ne? Bonvolu kontroli post 42 jaroj!

Ne vizio sed jam reala progreso estas nova super-sekurec-rimedo: skanaparato, kiu montras homojn en flughavenoj tute nudaj, tiel ke oni povas malkovri ekzemple ceramikan tranĉilon (unu el la plej oftaj teroristaj armiloj), kio ĝis nun ne eblis. Ke la skanilo montras ankaŭ seksorganojn kaj mamoprotezon, ne ĝenu nin – vidas ilin ja ne la publiko, sed nur sekurec-gvatuloj. EU-komisiono volas enkonduki tiun ĉi revolucion sistemon en ĉiuj flughavenoj. Kritiki, ke tio signifus vitrigi homojn, preteras la veran intencon. Avi-kompanioj ja prefere nomas siajn pasaĝerojn „flug-gastoj“; estonte ni do gastos en nudista orgio. Kia bela perspektivo (aŭ vizio), almenaŭ por prudentaj nepruduloj. ■

LITOVIO

Ek al profesia armeo

En septembro la litova ministro pri defendado, Juozas Olekas, subskribis dekreton por nuligi devigan militservadon. Anstataŭe la parlamento decidis transiri al profesia kaj libervola armeo.

Laŭ Olekas restas konstitucia devo defendi la patrujon. Tial, aldonis la ministro, tiuj, kiuj revas pri soldata kariero, estos akceptitaj en novstila armeo. Tiuj, kiuj nun devige militservas, estos demiigitaj antaŭ la 1a de julio 2009.

La decidon trafis la parlamento post la konflikto inter Kartvelio kaj Rusio. Tiam estiĝis diskutoj, ĉu Litovio – najbare al Rusio – povas senti sin sekura. Argumentis Olekas, ke litovan sekurecon garantias membreco en Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). La tasko de la ŝtato, diris Olekas, konsistas en kunlaboro kun NATO kaj partoprenado en pacdefendaj misioj.

En intervjuo kun germana gazeto esprimis kontraŭan opinion la prezidanto de Litovio, Valdas Adamkus. Li diris, ke, se frenezuloj en Rusio volus invadi Litovion, tion ili povus fari ene de kelkaj minutoj. Tamen lia ministro pri defendado atentigis, ke nun Litovio estas multe pli sekura ol antaŭ 2004, ne nur pro membreco en NATO, sed ankaŭ pro pli bona armado kaj pro pli kvalita soldata preparado.



LAST



LAST



LAST



JOAKSO

La litova ministro pri defendado, Juozas Olekas, fidus je NATO por protekti sian landon.

Litovaj soldatoj ne plu devige militservados, sed apartenos al libervola kaj pli profesia armeo.

Elitulo elektita

La 24an de septembro Aso Taro estis elektita la 92a japana ĉefministro. Aso apartenas al elita kaj riĉega familio. Lia patrino estas filino de ĉefministro Joŝida Ŝigeru, kiu gvidis Japanion post la dua mondmilito. Lia praaŭo Aso Takiĉi posedis karbominejojn kaj elektran, fervojan kaj bankan entreprenojn.

En intervjuo diris Aso: „Inter la loĝantoj estas maltrankvilo pri la ekonomio, malkontento pri la vivo kaj malfido pri la politiko. Mia tasko estas igi Japanion serena kaj forta.” Maltrankviliĝis multaj japanoj: „forta” ĝenerale signifas „arme forta”.

La antaŭlasta ĉefministro Abe uzis la sloganon „Bela lando Japanio”, per kiu li celis, ke Japanio kapablu batali kun Usono en eksterlando. Japanoj nun kredas, ke eble la vorto „forta” samsignifas, kaj ke Aso intencas milite kaj arme forigi Japanion.

Konstitucio

Antaŭa ĉefministro Koizumi Ĵuniĉiro apogis la militojn de Usono en Afganio kaj Irako kaj, kontraŭ la konstitucio, sendis japanajn soldatojn al Irako kaj liveris nafton al ŝiparo subtenanta la militon en Afganio. Enlande li sekvis usonan konsilon kaj liberigis la merkatojn, tiel malstabiligante la socion kaj naskante multajn malriĉulojn, precipe inter gejunuloj.

Ĉar Koizumi klare parolis kaj tiel kredigis, ke li ŝanĝos la socion, multaj lin subtenis. Pro tio venkegis en la lastaj elektoj la reganta Liberala Demokrata Partio. Tamen iom post iom seniluziiĝis la popolo, kaj lia abrupta eksiĝo klare montris karakteron ŝanĝiĝeman.

Kiam Koizumi anoncis sian intencon heredigis al sia filo sian elektodistrikton, japanoj fine vidis, ke ankaŭ li estas fine nur banala politikisto, kiel la aliaj, kiujn li kritikis.

HORI JASUO

ALBANIO

Azilo – eskapilo

Rimarkinde estas, ke krimuloj enlande kondamnitaj al dumviva enkarcerigo tamen eksterlande akiras politikan azilon. Lastatempe juĝejo en Tirano, post 12 jaroj da procesado, kondamnis tri membrojn de la grupo „Venĝo pro Justeco” al dumviva enprizonigo. La grupo respondecis pri pluraj murdoj. Tamen anoj de la triopo jam fuĝis al Nederlando kaj Svedio kaj tie ricevis azilon.

Same pri la „Bando de Lushnja”,

kies ĉefo ricevis azilon en Turkio, kaj pri la „Bando de Haklaj”, el kiu restas nur du (aliaj estas enlande mortigitaj dum krimulaj interbataloj) en azilo en Svedio. Ankaŭ Usono proponas azilon al kondamnitaj ne nur el Albanio. Laŭ ĵurnalo Usono pasintjare donis azilon al 26 113 homoj, inkluzive de 548 albanoj. Nederlando promesis azilon al 30 000 homoj okaze de amnestio por ĉiuj, kiuj petis antaŭ aprilo 2001.

Bardhyl SELIMI

HUNGARIO

Referendumo malsaniga

Restas solaj en la hungara registaro la socialistoj, ĉar post referendumo pri san-kostoj forlasis la kabineton la liberaldemokratoj. La ministraro proponis, ke malsanuloj pagu por viziti kuraciston. Tio kostus iomete pli ol unu eŭron, tamen en referendumo preskaŭ la tuta popolo kontraŭis la proponon.

Rezultis minoritata kabineto. La dekstra bloko tuj postulis eksterordinaran baloton, dum aliaj insistis aŭ starigi laŭokazan kabineton aŭ forigi la ĉefministron.

Dekstra bloko

La dekstruloj prezentis nekonfido-proponon en la parlamento, sed la liberaldemokratoj apogis la kabineton. Ili esperis tiel fortigi sian partion, kaj do forigi la kabineton kaj aliĝi al la dekstra bloko estus sence. Sed tia politikado montriĝis nekomprenebla al la publiko.

La nuna kabineto havas mandaton ĝis printempo 2010. Tiam, laŭ opinisondadoj, grandskale venkos la dekstruloj, dum la liberaldemokratoj adiaŭos al la parlamento.

Karlo JUHAŠZ

Artikolojn pri la politiko en via regiono sendu al politiko@monato.net.

KOREIO

Vundita lando

La korea milito komenciĝis en 1950 kaj daŭris tri jarojn. Armistico estis subskribita. Pacotraktato ankoraŭ ne venis. Ĉu ni diru, ke la tuta lando atendas ĝin? Eble ne, ĉar okaze ke tia oficiala paŝo estus farita, la nuntempe videbla limo estus firmigita, kaj tion koreoj ne volas. Multaj sud-koreoj deziras reunuiĝon, tion montras la paperetoj, kiuj troviĝas ĉe la muro en la stacidomo de Imjingang [imĝingan]. Kion deziras la nord-koreoj? Oni ne povas scii ...

La tridek-oka paralelo

Por varti la limon, Sud-Koreio elektis en 1953 du neŭtralajn ŝtatojn: Svis-

landon kaj Svedion. Nord-koreoj elektis tiam Pollandon kaj Ĉeĥoslovakion. Tamen ĉio ŝanĝiĝis en Eŭropo en 1989: Sovetio disfalis. Konsekvence Pollando fariĝis demokratio kaj Ĉeĥoslovakio disiĝis kaj same evoluis al du demokratiaj ŝtatoj. Tio ne povis plaĉi al Nord-Koreio, fama komunisma lando. Do la nord-koreoj forĉasis la soldatojn de tiuj du helpemaj ŝtatoj. Tio okazis perforte: Nord-koreoj ĉesis liveri elektron kaj akvon al la pola taĉmento. Dum kelkaj monatoj svisoj liveris al siaj kolegoj ion por manĝi, sed la situacio fariĝis neeltenebla. Poloj foriris. Nuntempe ili revenas unufoje jare, tamen tra Sud-Ko-


reio, ili tute ne plu povas eniri Nord-Koreion. En 2008 deĵoras en tiu zono kvin oficiroj svisaj kaj kvin oficiroj svedaj.

Vizito

Panmunjom [panmunĝom] estas urbo sur la senarmila linio inter la du koreaj ŝtatoj. Por klopodi atingi tiun lokon, Mirejo kontaktis en aprilo la svisan registaron en Berno, ĉefurbo de Svislando. Ŝi petis inviton validan por si kaj por tri koreoj el la suda parto. Endas scii, ke ekzistas turismaj ekskursoj por iri tien, sed ke sud-koreoj devas ricevi permeson ĉe sia registaro por aliĝi, kaj tio ne ofte okazas. Rezulte la tri samideanoj estis



Multaj sud-koreoj deziras reunuiĝon, tion montras la paperetoj, kiuj troviĝas ĉe la muro en la stacidomo de Imjingang.



La svisa kolonelo Albert Ulrich klarigas pri la lima situacio.



Albert Ulrich bonvenigas gastojn.

tre kontentaj esti invititaj de la svisa delegacio.

Sabate la 20an de septembro 2008 veturilo de NNSC (*Neutral Nations Supervisory Commission*) atendis nin en la malgranda stacidomo Imjingang ĉirkaŭ 60 km norde de Seulo. Svisa kolonelo Albert Ulrich [ulriĥ] atendis nin ene. Li ĉion klarigis al ni, li donis al ni kafon aŭ teon, li faris prezenton pere de komputilo. Li ankaŭ respondis al ĉiuj niaj demandoj. Li kaj Mirejo interparolis en la

franca lingvo kaj Mirejo tradukis al Esperanto por siaj tri kunuloj, sinjoro Lee Jung Kee, sinjoro Kim kaj sinjoro Lim. Oficiro sveda venis saluti nin.

Ni vidis Nord-Koreion

Tre impresa estas tiu loko. Tiom da historiaj kaj homaj eventoj okazis tie. Tiom da tristeco naskiĝas de tiu nenormala situacio, ke lando, popolo, estas tiel disŝirita ...

El la prezento de la situacio fare de



Imjingang [imĝingan] kuŝas inter Pyeongyang kaj Seoul.

la svisa kolonelo Albert Ulrich la 20an de septembro 2008 kompreniĝas, ke 9 faktoroj povas influi la estontecon de Koreio:

- la sanstato de la ŝtatestro de Nord-Koreio kaj la problemo de la sekvo;
- la evoluo de la politika situacio en Sud-Koreio (dekstra registaro aŭ maldekstra ...);
- la disvolviĝo de nukleaj armiloj en Nord-Koreio kaj eblaj sekvaj punoj fare de UN;
- la politika ekvilibro en la regiono, kiu entenas Koreion, sudan parton kaj nordan parton, Rusion, Ĉinion kaj Japanion;
- la konsekvencoj de la transdono de la decidpovo de Usono al Sud-Koreio, kiu ekvalidos en 2012;
- la nova organizado de usonaj soldatoj en Sud-Koreio;
- la diskutoj inter „ses ŝtatoj” enplektitaj en traktado pri Koreio;
- la duŝtataj rilatoj nordo-sudo;
- la estonteco de *United Nations Command (UNC)*, organo kreita de Unuiĝintaj Nacioj en 1953 por mastrumi kaj administri tiun ĉi regionon de la mondo kaj transdonita al Usono.

Germanio atingis reunuiĝon. Vjetnamio atingis reunuiĝon. Kiam venos la vico de Koreio, kiu estas la sola lando dividita pro ideologio sur nia tergloblo?

GROSJEAN Mirejo kaj LEE Jung Kee

Urbestro-protesto

Ahmed Aboutaleb [amed abutaleb] estas nederlanda politikisto, kiu naskiĝis en 1961 kiel filo de imamo en vilaĝo en Rif-montaro en Maroko. En 1976 kun patrino kaj fratoj li venis al Nederlando, fariĝis nederlanda ŝtatanano, rapide lernis la nacian lingvon, studis kaj baldaŭ eklaboris kiel ĵurnalisto, unue ĉe radio kaj poste ĉe diversaj komercaj televidaj kompanioj.

Poste li fariĝis raportisto por la amaskomunikiloj ĉe la ministrejo pri bonfarto, popolsano kaj kulturo. En Amsterdamo li ekaktivis politike, fariĝis en 2004 skabeno por la socialisma Partio de la Laboro. En 2007 kiel unua „novnederlandano” li fariĝis vicministro pri sociaj aferoj kaj laboro. Meze de oktobro 2008 la roterdama urba konsilantaro elektis lin nova urbestro.

Forte protestis la loka dekstrisma partio „Roterdamo Vivebla”, kiu ĝenerale kontraŭas influon de ne-aŭtoktonaj nederlandanoj kaj precipe de islamanoj. Aboutaleb estas islamano.

Murdo

Dum lia skabena periodo en Amsterdamo okazis la murdo je la dekstra politikisto Theo van Gogh [van ĥoĥ]. Je tiu okazo Aboutaleb sin montris vera gvidanto inspira. Interalie li emfazis, ke Nederlando preferas multkulturecon, kaj, se iu ne povas akcepti la idealojn de la nederlanda socio, prefere tiu simple – laŭ Aboutaleb – „paku siajn kofrojn kaj foriru al alia lando”. Krome: „Ni ne ŝatas forsendi homojn, sed oni ja simple povas mem iri.”

Unu el la problemoj ĉe lia kandidaĵo – ankoraŭ oficiale efektivigota de la koncerna ministro – supozeble ree estas la fakto, ke Aboutaleb, kiel marokdevena, estas duŝtatana: nederlanda kaj

maroka. Laŭleĝe en Maroko ne eblas rezigni pri ies ŝtataneco: estas jam de longe temo de diskutoj inter ambaŭ landoj. Kiam Aboutaleb fariĝis vicministro, tio

ankaŭ kondukis al fortegaj debatoj kaj protestoj el dekstrisma naciisma rondo.

Gerrit BERVELING



Ahmed Aboutaleb estas unua „novnederlandano” kiu fariĝis urbestro.

LITOVIO

Jarmila odiseado



Dek kapitanoj kun dek skipoj gvidos la jahton Ambersail ĉirkaŭ la mondo.

En 2009 Litovio celebros mil jarojn de post sia nomado. Tial 120 litovaj velŝipistoj kun slogano „Jarmila odiseado. Unu nomo – Litovio” komencis naŭ-monatan ekspedicion ĉirkaŭ la mondo por instigi litovajn komunumojn kune festi la jarmilon.

La ekspedicio havos 11 etapojn, kiujn laŭvice gvidos 10 profesiaj kapitanoj kun siaj skipoj. La jahto *Ambersail* (Velo sukkena) navigos 37 000 mar-mejlojn (68 500 km) kaj vizitos 19 landojn en ĉiuj kvin kontinentoj.

Ambersail apartenas al la jahto-klaso *Volvo 60*. Ĝi longas 19 m, larĝas 5 m kaj pezas 13 500 kg. En la jahto malmultas komforto: ne ekzistas apartaj kajutoj kaj la ŝipanoj dividas necesejon kaj konsumas samspecan manĝaĵon.

Navigado

Laŭ la kapitanoj, la plej danĝera etapo estos la rondnavigado de la Horna Kabo en Suda Ameriko, kiu dividas Atlantikon kaj Pacifikon. Tie ondoj altas



La jahto Ambersail kontaktos litovojn en ĉiuj kvin kontinentoj.

25 m kaj longas 150 m. Se komplezos la vetero, flirtos la litova flago ĉe la Horna Kabo la 16an de februaro 2009, la tagon de la litova sendependeco.

La jahto revenos en Litovion la 6an de julio 2009, kiam litovoj tra la tuta mondo kunfestos la jarmilon.

LAST

KLERIGADO

Statistikoj studindaj

Laŭ lastaj statistikoj Albanio malantaŭiĝas rilate meznivelan kaj altnivelan edukadon kompare kun najbaraj balkanaj landoj. Tio evidentiĝas ekde la mezlernejo, kiu altiras malpli ol 70 % de la infanoj de la respektiva aĝo.

Albanoj pasigas averaĝe nur 12 jarojn en la lernejo, tio estas la plej mallonga studperiodo en la regiono. Cetero el abiturientoj nur 19,3 % vizitadas superajn lernejojn, inter kiuj estas 12 ŝtataj kaj 15 privataj universitatoj. En la unua loko, parenteze, sidas Bulgario, kie en mezlernejo studas 88 % kaj en supera lernejo 41 % de la gelernantoj. Sekvas Grekio, kun ciferoj de 87 % kaj 79 % respektive, Kroatio kun 85 % kaj 42 %, Rumanio kun 81 % kaj 40 % kaj Makedonio kun 81 % kaj 28 %.

Buĝeto

La ciferoj iomete spegulas la ŝtatan klerigan buĝeton de la koncernaj landoj: en Albanio nur 2,9 % de malneta enlanda produkto; en Bulgario 4,2 %, Bosnio 4,3 %, Kroatio 4,5 %, Makedonio 3,5 %, Rumanio 3,4 %, Grekio 4,2 % kaj Serbio 3 %.

La sola pozitiva indikilo por Albanio restas la elcentaĵo de analfabetoj – nur 1,3 % (en Makedonio 3,9 %, Kroatio 1,9 %, Bosnio 5 %, Grekio 4 %, Bulgario 1,8 %, Rumanio 2,7 % kaj Serbio 1 %).

Bardhyl SELIMI

La statistikojn preparis *Porpaca Tutmonda Indekso* (www.visionofhumanity.org/gpi/results/albania/2008).

JURO

En Interreton, en la karceron

En aprilo la polico arestis 22-jaran viron en la orient-flandra municipo Sint-Gillis-Waas, dum li sidis en sia aŭto kaj interretumis, uzante la neprotektitan reton de apuda domo. Najbaroj estis plurfoje rimarkintaj la saman scenon kaj pro tio avertis la policon. Post notado de liaj deklaroj la policistoj liberigis la viron kaj plusendis la dokumentojn al la esplorjuĝisto. En oktobro la retumanto venis antaŭ la tribunalo. La juĝisto deklaris lin kulpa pri regula enpenetrado en komputilan sistemon de alia persono sen ties permeso kaj punis lin per unujara enkarcerigo. La leĝo, kiu malpermesas tian uzon de Interreto, jam de multaj jaroj ekzistas, sed unuafoje okazis verdikto kun la maksimume ebla puno.

PP

Tabako ankoraŭ ne tabua

En 1966 fumis 84 % de la viroj kaj 18 % de la virinoj en Japanio, sed en 2007 fumis nur 40 % de la viroj kaj 13 % de la virinoj. Dum la pasintaj 40 jaroj akiris homoj pli da san-konscio, dum plifortiĝis movado kontraŭfumada.

Ekzemple en 2002 la kvartalo Ĉijoda en Tokio faris leĝon por malpermesi surstratan fumadon. Ĝis februaro 2008 sekvis 105 komunumoj. Simile, la urbo Ooita malpermesis fumi en taksioj: sekvis pliaj 16 gubernioj. La gubernio Kanagaŭa nun planas novan leĝon, ke en 16 specoj de konstruaĵoj, inkluzive de loĝejoj, lernejoj, hospitaloj, magazenoj, hoteloj, restoracioj kaj amuzejoj, oni ne rajtos fumi. Forte kontraŭas posedantoj de paĉinko-ludejoj, ĉar 80 % de ties vizitantoj estas fumantoj.

Karto

En julio 2008 estis enkondukita karto nomata *taspo*. Ĝi celas plenkreskulojn, kiuj aĉetas tabak-varojn el aŭtomataj vendomaŝinoj. La karto enhavas informon pri la posedanto kaj atestas, ke tiu, estante plenkreskulo, rajtas fumi. Laŭ enketo 70 % de geknaboj aĉetis cigaredojn el aŭtomatoj. Oni esperas, ke *taspo* tion malhelpos.

Krome konstateblas, ke *taspo* alimaniere influas. Ĝenas mendi la karton, kaj do multaj ne plu uzas aŭtomatojn. En la



Ne ĉiuj komunumoj malpermesas surstratan fumadon.

gubernio Kagoŝima, kie oni prove enkondukis la karton, 69 el 11600 tabakovendejoj jam fermiĝis. Iu tabakisto plendis, ke la vendosumo ĉe lia aŭtomato iĝis preskaŭ nulo, malpliiginte je 90 %.

En marto 2008 Sasagaŭa Joohei, la estro de la *Japana Fonduso*, proponis preskaŭ kvarobligi la prezon de skatolo kun 20 cigaredoj, de 273 enoj ĝis 1000 enoj (pli-malpli de 1,70 eŭroj ĝis 6 eŭroj). Tiel li volis plibonigi kaj la sanon de la nacio kaj la ŝtatan enspezon. Laŭ li, se la prezo tiel altiĝus, impostoj atingus 900 miliardojn da enoj. Eĉ se triono de la nunaj fumantoj ĉesus, impostoj sumus 300 miliardojn (pli ol la 220 miliardoj da tabak-impostoj en 2007).

Dungitoj

Kontraŭis la proponojn diversaj tabako-kompanioj, inkluzive de *Japana Tabako*, Asocio de Tabak-vendejoj, Asocio de Tabako-kultivistoj ktp. Ili argumentis, ke la kalkuloj senbaza. Malprosperus la tabak-industrioj, senlaborus dungitoj, kaj do la ŝtato malpli da impostoj rikoltus.

Aliaj argumentis, ke la nuna kontraŭfumada movado estas faŝisma,

ĉar ĝi traktas fumantojn kiel krimulojn. Iu verkisto diris, ke fumado estas japana kultura fenomeno, kiu datiĝas de antaŭ 400 jaroj. Aliflanke atentigis kontraŭfumantoj, ke tiu, kiu labortage ses fojojn dum 10 minutoj fumpaŭzas, dum tuta horo fakte ne laboras. Tiu redon al sia firmao elcentaĵon de sia salajro.

Kampanjo

La registaro multe dependas de tabak-impostoj. Pri kontraŭfumado ĝi ŝajnas pozitiva, sed unue ĝi servas kapitalistojn, nur due la popolon. Kiam ĝi proponis dum kontraŭkancera kampanjo duonigi la nombron de fumantoj, la kompanio Japana Tabak-industrio protestis ĉe la ministro de bonfarto kaj laboro. Subite ŝanĝiĝis la kampanjo, kaj la celo duonigi la nombron de fumantoj malaperis.

Tiamaniere la registaro profitas de popola malsano. Ne eblas tuj malpermesi vendi tabakon (kion faris la registaro de Butano). Eblas tamen altigi la prezon, eventuale al 2000 enoj, por ke homoj ne plu fumu.

HORI JASUO



La nuna monda financa krizo

Jam plurfoje la mondo travivis financon krizon. La plej konata estas tiu de 1929, kiun sekvis granda depresio. Ankaŭ nun la mondon trafulas tia krizo. Ĝi malsimilas pro siaj kaŭzoj, pro la ĝenerala ekonomia situacio kaj pro la rimedoj solvi ĝin.

Kaŭzoj

La krizon origine kaŭzis la hipoteka situacio en Usono. Multaj familioj aĉetis domon per tiel nomata subkvalita prunto, tio estas prunto kun varia interezo donita al personoj, kiuj fakte ne meritis krediton. Tio okazis en periodo kun ege malaltaj interezoj. Pro la plialtiĝo de la interezoj intertempe multaj familioj ne plu kapablas repagi la pruntan. Ili devas vendi sian domon, kaj pro tio la domprezoj falas: la komenco de mortiga spiralo. Okaze de deviga vendo la bankoj ne plu sukcesas reakiri la pruntitan monon, ili iĝas pli striktaj pri repagoj, aliaj homoj ne povas repagi kaj do devas ankaŭ vendi sian domon ktp. Jen la unua problemo solvenda.

Tio estus nur usona problemo, se la bankoj ne estus tro malpaciencaj. Ili „enkakis” la hipotekajn pruntojn en komplikaj financaj produktoj, kiujn ili vendis al aliaj bankoj. Tiel ili rehavis la monon kaj povis denove pruntedoni ĝin al aliaj. Ili do uzis la saman monon plurfoje, sed samtempe iĝis pli vundeblaj kaj riskhavaj. Tiel aperis la dua problemo: la risko je kolapso de la bankoj pligrandiĝis. Ni vidis la rezulton: unu banko bankrotis, multaj aliaj bankoj estis savitaj nur per ŝtatigo aŭ per aliaj multekostegaj rimedoj.

Pro la favoraj kondiĉoj de tiuj financaj produktoj aliaj bankoj volonte aĉetis ilin. Ne maltrankviligis ilin, ke la banko, kiu vendis la pruntojn al ili, mem kon-

servis nenian riskon, eĉ ne ekzemple kelkajn procentojn. Aldone famaj firmaoj kiel *Moody's*, *Standard and Poor's* kaj kolegoj, kiuj difinas kvalituĝon pri financaj produktoj, donis tro favoran juĝon. Tiel ili kredigis, ke tiuj produktoj donis samtempe altan interezon kaj malaltan riskon. Jen la tria problemo. Tiu lasta intertempe estas solvita: ĉiuj denove konscias, ke en financoj daŭre validas senescepte la fundamenta regulo, ke risko kaj valoro estas proporciaj inter si: ne eblas, ke iu financa produkto kun alta interezo estas malaltriska.

Tiel la problemo ne restis en Usono, sed estis transportita al la tuta mondo. La pruntintoj en Usono ne povis repagi, la bankoj devis noti grandajn perdojn, kiujn ili transdonis al la bankoj tra la tuta mondo, kiuj volonte estis aĉetintaj tiajn financajn produktojn, sed tiel samtempe heredis la riskojn.

La lastajn jarojn ekvalidis novaj librotenaj normoj, nomataj *International Financial Reporting Standards* (Internaciaj Financaj Raportadaj Normoj), mallonge IFRS. Tiuj devigas ĉiujn bankojn librotene financajn produktojn, kiel akciojn de aliaj kompanioj, je la aktuala vendovalor. Pro la malplivaloriĝo de iuj kompanioj, aliaj kiuj posedis ties akciojn librotene ankaŭ malplivaloriĝis. Jen alia mortiga spiralo. Tiu kvara problemo verŝajne estos iom solvita per redifino de la librotenaj normoj. Eĉ jam nun EU kaj Usono permesas malpli rigoran aplikadon de IFRS ekde la tria kvarono de



La problemo ne restis en Usono, sed estis transportita al la tuta mondo.

2008. Tio ebligis al *Deutsche Bank*, kiel la unua, aperigi eĉ profiton en tiu jarkvarono. Intertempe tiuj normoj kaŭzis, ke ĉiuj financaj kompanioj malplivaloriĝis, kvankam nur surpapere. Iam la merkato denove plipozitivigis, kaj sekvis la akcioj, kaj do sekvis nova spiralo, ĉi-foje pozitiva.

Grava elemento estas, ke la bankoj ne plu fidis unu la alian. Normale inter la bankoj ja ĉiutage fluas multege da mono per mallongdaŭraj pruntoj. Tiu monfluo haltis, ĉar la bankoj, kiuj pruntedonu al aliaj, ne plu fidis je la repago en la sekvaj tagoj, kaj do ne plu volis pruntedoni. Tiel aperis problemoj ĉe la bankoj, kiuj urĝe bezonas monon: aŭ ili pagu tre altan interezon, aŭ ili ne ricevos la monon kaj do ne povos mem repagi siajn ŝuldojn kaj bankrotos. Sana banko povas bankroti ene de kelkaj tagoj pro manko de tuj havebla mono. Jenla kvina problemo.

Ĉiuj problemoj kune kaŭzis krizon

Ni ne timu la situacion de la 1930aj jaroj. Ja estas grandaj diferencoj, ne nur pro la kaŭzoj de la krizo. Tiam la kom-

panioj ĝenerale havis multe pli da ŝuldoj ol nun kaj reguligo pri bankoj preskaŭ ne ekzistis. Nun, kompare al pli fruaj krizoj, la ŝtatoj intervenis rapide kaj amase. Kaj precipe: tiam la ŝtatoj lasis bankojn bankroti. Tion ili ĉi-foje absolute volas eviti. Ŝajnas, ke la nuna krizo ne bezonos dek jarojn por solviĝi.

Usono: la origino

Por bremsi kaj haltigi la krizan spiralon urĝe devis interveni la ŝtatoj. Kompreneble Usono devis ekagi la unua, ĉar tie ekestis la problemoj. Oni komence ŝajne iom improvizis: Usono savis la bankon *Bear Stearns*, poste ne savis alian bankon *Lehman Brothers*, kiu bankrotis. Estis savitaj la plej grandaj hipotekbankoj *Freddie Mac* kaj *Fannie Mae* kaj eĉ la plej granda asekuristo en la mondo, *AIG*. Fine oni kreis „malbonan bankon” al kiu la aliaj bankoj rajtas vendi siajn fikreditojn. La ideo estas, ke tiam la bankoj mem denove estos „puraj” kaj la interbankaj monpruntoj denove ekfluos. Tamen poste oni decidis uzi la 700 miliardojn da dolaroj destinitaj al tiu banko parte por kelkajara duonŝtatigo de problembankoj, laŭ la ekzemplo de Eŭropo.

Samtempe kulminis la kampanjoj por la prezident-elektado en Usono. La demokrata kandidato Obama plej multe profitis el la financa krizo.

Konkrete ekzemplo: Belgio

En Belgio dum oktobro 2008 la banka pejzaĝo plene ŝanĝiĝis. *Fortis* krom la menciitajn problemojn havis aldonan: meze de 2007 kaj do ĵus antaŭ la ekesto de la krizo, ĝi je altega prezo aĉetis la nederlandan bankon *ABN-AMRO*. Pro la krizo ĝi ne povis kolekti la bezonatan monon kaj fine preskaŭ bankrotis. La ŝtato intervenis kaj en du semajnfinoj splitigis la bankon en nederlanda parto,

vendita al la nederlanda ŝtato, kaj belga-luksemburga parto, vendita al la franca bankgrupo *BNP Paribas*. Postrestis la holdingo kun interalie granda parto de la fikreditoj, kies valoro surpapere falis ĝis preskaŭ nulo. Jen la fino de la plej granda banko de Belgio. Intertempe jam ekestis la unuaj juraj atakoj flanke de la akciuloj kontraŭ la ŝtato. Aldone

KBC tiel iĝis la sola granda banko de Belgio sen ŝtata interveno. Pluraj elementoj igas ĝin malpli vundebla: 54 % de ĝiaj akciuloj estas ligitaj inter si; ĝi ĉiam estis pli singarda rilate al komplikaj financaj produktoj; ĝi havas pozitivan proporcion inter mondeponoj kaj pruntoj kaj do malpli dependas de la interbankaj monfluoj; ĝi estas kapitale tre sekura kaj ĝi aktivas en Centra Eŭropo, kiu ĝis nun malpli suferas pro la kreditkrizo. Tio cetere ebligis al ĝi describi en unu movo, la 15an de oktobro 2008, valormalpliigojn je 1,6 miliardoj da eŭroj (multe pli ol ĝi nepre devis), por ke ne aperu surprizoj en la estonteco.

Sed ankaŭ la kurzo de ĝia akcio ege falis: de 106 eŭroj en majo 2007 al 20,6 eŭroj je la 24a de oktobro 2008. En la sekva semajnfino ĝi petis kaj ricevis ŝtatan kapitalprunton de 3,5 miliardoj da eŭroj, sen perdo por la akciuloj. Oni denove emfazis, ke la baza kapitalproporcio de la banko sufiĉus dum normalaj tempoj, ĉar ĝi estis preskaŭ la duoblo de la leĝe devigaj 4 %. Tamen pro la nuna krizo akciuloj postulas pli ol 10 %, kaj tial *KBC* altigis sian ĝis 10,6 %. Tion sekvis plialtiĝo de la akcia kurzo. Ĝi postvivis la krizon, same kiel verŝajne la plimulto de la malpli grandaj bankoj.



KBC iĝis la sola granda banko de Belgio sen ŝtata interveno.

oni akuzas la ĉefojn de *Fortis*, ke ili intence mensoge informis la merkaton pri ĝiaj krizperdoj. La *Fortis*-krizo verŝajne postvivros plurajn jarojn.

Tuj sekvis *Dexia*, sed tiu estis savita per kunlaboro belga-franca. Ambaŭ ŝtatoj grandparte ŝtatigis ĝin. Tiu banko tamen ne perdiĝis. Klaĉoj diras ke la ŝtato ne povis permesi ĝian bankroton aŭ splitiĝon, pro tio ke samtempe ĝi, pere de la municipoj, estas la plej grava kliento de *Dexia* kaj do perdis amason da mono.

Eŭropo

En Nederlando *ING* jam antaŭe petis kaj ricevis 10 miliardojn da eŭroj de la nederlanda ŝtato por plifortigi sian kapitalbazon. La asekuristo *Aegon* poste ricevis 3 miliardojn. Aliaj sekvos.

Same bone kiel *KBC* travivos la krizon la hispanaj bankoj, interalie ĉar la hispana bankkontrolado okazis pli severe ol en la plimulto de la landoj. *Banco Santander*, la plej granda en Hispanio, eĉ transprenis en la lastaj monatoj britan kaj usonan bankojn kaj restas profitdona.



Komenco de novembro: iom post iom akcioj kaj borsoj releviĝas.

La brita *Northern Rock* en Eŭropo estis la unua atakita banko, meze de septembro 2007. La ŝparantoj ne plu fidis ĝin, enviciĝis ĉe la giĉetoj kaj repostulis sian monon. Tio kaŭzis tiom grandan elfluon de mono, ke ĝi devis esti savita per ŝtata interveno. Plurajn aliajn bankojn minacis simila scenaro, se la ŝtato ne estus interveninta tuj. En Britio poste sekvis interalie ŝtatigo de *HBOS* kaj *RBS*.

Poste eĉ Svislando devis interveni per preskaŭ 4 miliardoj da eŭroj por savi sian plej grandan bankon, *UBS*. La plej granda aŭstra banko, *Erste Bank*, ricevis preskaŭ 3 miliardojn de la ŝtato, malgraŭ granda jarprofito kaj solida kapitalbazo. Multas tiaj ekzemploj.

La situacio en Islando estas aparte malbona. Tie ĉiuj tri plej grandaj bankoj, *Kaupthing*, *Landsbanki* kaj *Glitnir*, devis esti savitaj de la ŝtato por ne bankroti, sed pro tio la islanda ŝtato mem bankrotis. Ĝi jam antaŭe havis grandegan ŝtatan ŝuldon (la kvinoblon de la jara malneta enlanda produkto) kaj do ne disponis pri la mono por savi siajn bankojn. Parte intervenis Svedio kaj la islanda ŝtato traktis kun Rusio kaj Norvegio pri moninjekto. Fine la Internacia Mona Fonduso intervenis kaj, kune kun Japanio kaj la skandinavaj landoj, aljuĝis prunton je 4 miliardoj da eŭroj al la islanda ŝtato. La IMF entute rezervis

ĉirkaŭ 160 miliardojn da eŭroj por tiaj intervenoj, el kiuj en oktobro 13 jam iris al Ukrainio kaj 20 al Hungario.

Post longa hezitado, en la dua semajnfino de oktobro, la eŭrolandoj kaj poste la tuta Eŭropa Unio kunordigite agis, plialtigante la garantion je ŝpardeponoj ĉe ĉiuj siaj bankoj al minimume 50 000 eŭroj, injektante cent milionojn da eŭroj en la interbankan merkaton kaj permeante pli facilan ŝtatigon de problem-bankoj. Tion sekvis kelktaga pliboniĝo en la borso, sed poste reaperis tamen la pesimismo. La batalo ne jam finiĝis, kvankam grava faktoro, la kvina problemo ĉi-supra, estis solvita same en Usono kiel en Eŭropo.

Lecionoj lernitaj?

Estas ankoraŭ tro frue por prognozi, kiel finiĝos ĉi tiu krizo. Ĉu la ŝtatoj povas fari pli ol kiom ili jam faras? Grava faktoro povus esti devigo al la bankoj klare malkaŝi ĉiujn siajn eblajn financajn konsekvencojn de la kreditkrizo. La fakto, ke ili inter si ne scias, kiu havas aŭ ne havas kreditproblemojn ja kaŭzas, ke ili ĉiuj ne povas fidi unu la alian kaj tiel la interbankaj monfluoj restas multekostaj kaj nesufiĉaj. Tion ŝanĝi eblas nur per ŝtata interveno.

Ĉu la amasaj moninjektoj fare de la ŝtatoj kaj ties centraj bankoj sufiĉos por haltigi la negativan spiralon? Ĉu oni reformos la financon sistemon por eviti ripeton de la samaj problemoj? Kiam estos regajnitaj la 2000 miliardoj da eŭroj elspesitaj por deskriboj kaj perdoj pro la krizo?

Antaŭvideble, la bankoj dum multaj jaroj ne plu same facile kaj nesingarde pruntedonos monon al siaj klientoj, kio solvos la unuan problemon. Sed la memorkapablo de tiaj kompanioj ne estas poreterna kaj iam certe reaperos similaj eraroj.

Oni povas atendi, ke la ŝtata kontrolo de financaj institucioj iĝos pli severa kaj internacia, por ke bankoj ne akceptu tro grandajn riskojn, ne nur en la hipoteka merkato, sed ankaŭ inter si. La komplikaj financaj produktoj estos pli severe prijuĝataj, la bankoj, kiuj per ili vendas siajn riskojn, estos devigitaj konservi

parton de la risko ktp.

Oni povas atendi malstriktiĝon de la IFRS-normoj, tiel ke dumtempa problemo en la financa merkato ne plu tuj infektos la tutan merkaton.

Plua evoluo

Ne nur Obama profitis el la krizo. Samtempe la vendejoj pri uzitaj varoj furoras, same kiel vendoj de monŝrankoj kaj la tuta sekurecsektoro.

Ŝajnas, ke oktobro 2008 signis la plej profundan punkton de la krizo, almenaŭ koncerne la financon sektoron. Aliflanke, la problemoj nun iom post iom ektransiras al la tiel nomata reala ekonomio. Ili ne restos limigitaj al bankoj kaj asekurkompanioj. Ĉar por savi sin la bankoj iĝis pli singardaj, kompanio kiu volas investi, malpli facile trovos bankon preta pruntedoni la bezonatan monon. Investado do malpliĝos kaj la ekonomia kreskado haltos. Oni eĉ timas malkreskadon, precipe en Usono. Samtempe kompanioj, kiuj bezonas pruntojn por la ekzistanta funkciado, devos pagi pli altajn interezojn kaj tiun aldonan koston transkalkulos al siaj propraj prezoj. Tial prezoj ĝenerale plialtiĝos. Ili ankaŭ pli atentos la kostojn, inter aliaj salajrojn, do minacas maldungoj. Kompanioj kiel *General Motors* kaj *Ford* estis inter la unuaj, kiuj spertis tiajn malfacilaĵojn.

La praktiko provizore indikas tamen, ke tiu scenaro estas troigita. La pruntado laŭ realaj ciferoj eĉ kreskas. Feliĉe intertempe la interezo de la centraj bankoj malpliĝis (en Usono ekzemple fine de oktobro jam al nur 1 %) kaj pro la iniciatoj de la ŝtatoj ankaŭ la interbanka interezo jam konsiderinde malpliĝadas. Tio stimulus la relanĉon de la ekonomioj.

La krizo nun ankaŭ eketendiĝas al Rusio, Sud-Koreio, Brazilo kaj similaj „kreskolandoj”. Laŭ *Morgan Stanley*, en tiuj landoj povus ekesti plia centro de la financa krizo.

Post jaro ni povos retrorigardi. Tiam ekonomikistoj denove povos fari, kion ili plej bone kapablas fari: klarigi post la faktoj, kion oni estus devinta fari dum la krizo antaŭ jaro kaj klarigi kial oni eraris meze de la ŝtormo.

Marc VANDEN BEMPT

LITOVIO

Ĉu oni timu inflacion?

La longtempe kreskanta ekonomio de Litovio finfine kaŭzas problemojn, kiuj kapdolorigas la registaron kaj loĝantaron. Unu el la plej gravaj estas la inflacio, kiu en aŭgusto atingis 12,2 % sur jara bazo. La registaro lanĉis planon por bremsi la inflacion. Dume loĝantoj vole-nevole komencis ŝpari.

En tia situacio iom strange aspektas alvoko de financaj makleristoj de la kompanio *FinHill*, kiuj proponas ne batali kontraŭ la inflacio. Ili konsilas ne sekvi la ekzemplon de najbaraj Latvio kaj Estonio, kies preventplanoj baziĝas sur ega ŝparo, ĉar pro ŝparado stagnos ankaŭ la ekonomio. „Povas okazi, ke post tri aŭ kvar monatoj, pro ekstera influo, la ekonomio tiom malrapidiĝos, ke ne plu indos batali kontraŭ inflacio, ĉar ĝi aŭtomate ĉesos”, opinias la finan-

cistoj.

Laŭ ili, nuntempe la ekonomio de Litovio – kaj de la tuta Eŭropo – estas forte influata de deflaciaj procezoj: malkresko de la valoro de nemoveblaĵoj, malaltiĝo de prezoj de krudmaterialoj kaj falo de la postulo en la ĉefaj eksportmerkatoj. Tamen tiujn ĉi procezojn hodiaŭ kaŝas la altiĝo de prezoj de energio kaj nutraĵproduktoj, kiuj respondecas pri ĉirkaŭ duono de la nuna inflacio. Sen tio, el la nuna ducifera inflacio en Lito-

vio restus nur ĉirkaŭ 6 % kaj en eŭronono apenaŭ 1,8 %.

Ajna striktigo de fiska politiko kun celo haltigi inflacion bremsos ekonomian evoluon kaj tute ne influos inflacion, ĉar la litoviaj rimedoj ne kapablos influi la mondajn prezojn de nutraĵo kaj energio. La inflacio elĉerpiĝos aŭtomate, kiam la energiprezoj malkreskos, kaj ŝajne tiu ĉi procezo jam ekis.

LAST



La registaro lanĉis planon por bremsi la inflacion. Dume loĝantoj vole-nevole komencis ŝpari.

MONTENEGRO

Vidinda ponto

Super la rivero Tara estas unu el la plej belaj pontoj de Montenegro. Ĝi troviĝas je 24 km for de Žabljak en la nord-okcidenta parto de la lando. La ponto estis konstruita de 1938 ĝis 1940 laŭ projekto de Mijat Trojanović, konata serba arkitekto. Ĝi estas unu el liaj plej gravaj konstruprojektoj.

La ponto estas longa 370 metrojn, larĝa 6 metrojn kaj ĝia alteco super la rivero estas 150 metroj. Ĝi havas kvin arkojn kaj tiu super la rivero mem estas la plej granda.

Tuj post la finkonstruado de la ponto Jugoslavio eniris la duan mondmiliton. La tiama jugoslava militistaro ordonis al inĝeniero Lazar Jauković, partopreninta en la konstruado de la ponto, ke li tiel detruigu ĝin, ke ĝi estu rapide rekonstruebla post la militfino. Bedaŭrinde



Ponto super rivero Tara.

soldatoj de naziaj trupoj arestis kaj pafmortigis lin sur la detruita ponto. Sur la ponto nun staras memortabulo omaĝe al inĝeniero Jauković.

Post la fino de la dua mondmilito la projektanto Trojanović, reveninte el militkaptitejo, gvidis la laborojn por rekonstruo de la ponto super Tara. La trafiko laŭ ĝi ekfunkciis fine de 1945.

Venontjare oni notos la sepdekjariĝon de konstrufino de la vidinda ponto, kiu

estas ero de nuna nacia naturparko Durmitor. Ĝia konstruado en la kanjono de rivero Tara antaŭe estis vera heroaĵo, kaj nun prezentas gravan vidindaĵon kaj raraĵon inter la pontoj.

La ponto, alta kaj gracia, ne difektis la belecon kaj naturmedion de rivero Tara. Ĝia kanjono apartenas al la plej belaj en la mondo. La flosado laŭ Tara estas turisma allogaĵo.

Dimitrije JANIČIĆ

VOJAĜGVIDILOJ

„Antverpeno inter la pintaj 10 urboj”

La internacia vojaĝgvidilo *Lonely Planet* ekde tiu ĉi jaro listigas Antverpenon en sia prestiĝa listo de la 10 nepre vidindaj turismaj urboj. La gvidilo ĉiujare aktualigas sian liston kaj rekomendas, kiu urbo en la venonta jaro certe meritas viziton. „La urbo, kiu estas riĉa je historio, estas la plej subtaksata turisma celo en Belgio”, skribas *Lonely Planet*. „Malmultaj lokoj regas vin per tia alloga miksaĵo de modernaj kaj klasikaj elementoj. Eklektikaj nov-artaj

domoj staras tuj apud nov-renesancaj vilaoj, kaj mezepokaj kasteloj donas magian dekoracion al tiuj, kiuj sidas en la sennombraj trinkejoj kaj terasoj.”

La 9 aliaj elektitaj urboj, kiuj laŭ la gvidlibro nepre vidindas, estas Bejruto, Ĉikago, Glasgovo, Lisbono, Meksiko, Sao Paŭlo, Ŝanhajo, Varsovio kaj Zuriko. *Lonely Planet* estas anglalingva gvidlibro, kiun aĉetas kaj uzas ĉefe dorsosakaj turistoj.



Antverpeno: nov-artaj domoj staras tuj apud nov-renesancaj vilaoj.

PP

PILGRIMEJOJ

„Dia Filo estu glorata dum jarcentoj”



Baziliko de la Naskiĝo de la Sankta Virgulino Maria.



La solenaĵon partoprenis la eksterordinara nuncio de la papo Joachim Meisner.



Kapelo de la aperoj.

Kun tiu slogano en septembro en la litova urbeto Ŝiluva estis vaste celebrata la 400a datreveno de la apero de la Sankta Virgulino Maria, oficiale konsiderata kiel ŝia unua apero en Eŭropo kaj unu el la kvin aperoj agnoskataj de la romkatolika eklezio.

La eta litova urbeto Ŝiluva, en la centro de la lando, ĉiuseptembre festas la tradician naskiĝtagon de Maria. La nombro de apenaŭ 800 loĝantoj tiam multobliĝas. Tamen tiom da gastoj,



Skulptaĵo de la Sankta Virgulino Maria el Krakovo.

pilgrimantoj, kiom ĝi vidis dum la ĉi-jara jubilea festado, la urbeto ne spertis antaŭe. En la inaŭgura jubilea patronfestado en Ŝiluva dum kvar tagoj partoprenis ĉirkaŭ 50 000 kredantoj. Dum la naŭ festotagoj la lokon vizitis ĉirkaŭ miliono da homoj. Perpiede tiun sanktan urbeton atingis pli ol du mil pilgrimantoj el diversaj lokoj de Litovio. Al Ŝiluva tra tuta Eŭropo estis perpiede portata kruco el Lourdes. Speciale por la ĉi-jara patronfestado estis dediĉita skulptaĵo de la Sankta Virgulino Maria muldita en la pola urbo Krakovo.

Ĉiu solena tago inter la 6a kaj la 15a de septembro estis riĉa je diversaj aranĝoj. La jubilea festado finiĝis per sankta meso sur la apudbazilika placo. La solenaĵon ankaŭ partoprenis eksterordinara nuncio de papo Benedikto la 16a, kardinalo Joachim Meisner. La kardinalo reprezentis la papon, kiu tiutempe gastis en la franca urbeto Lourdes, en kiu samspeca apero okazis antaŭ 150 jaroj.



Monumento pri papo Johano Paŭlo la 2a.



Inaŭguro de la monumento pri papo Johano Paŭlo la 2a.

non kun bebo en la manoj. La paŝtistoj tuj kuris al kalvina kateĥisto de Ŝiluva. Li vokis la instruiston Salamono. Kune ili proksimiĝis al la ŝtono kaj ekvidinte la plorantan virinon, ili ekparolis al ŝi: „Knabineto, kial vi ploras?” Ŝi respondis: „Mi ploras pro tio, ke antaŭe sur tiu ĉi loko estis adorata mia Filo kaj nun ĉi tie oni plugas kaj semas”. La rakonto pri la apero de Maria tuj disvastiĝis kaj la urbeto baldaŭ famiĝis per miraklaj resaniĝoj de malsanuloj.

La 7an de septembro 1993 en Ŝiluva gastis kaj ĉi tie preĝis papo Johano Paŭlo la 2a. Por omaĝi la 15an datrevenon de tiu ĉi vizito estis inaŭgurita monumento pri papo Johano Paŭlo la 2a. La inaŭguran leteron subskribis ĉiuj episkopoj, kiuj partoprenis la solenaĵon kaj la aŭtoro de la monumento. La ĉeestantoj esprimis la spertitan ĝojon pri la valora donaco por Ŝiluva.

La solenaĵo en Ŝiluva finiĝis per dankfesto.

LAST



HISTORIO

Oni rehabilitu papon Pio la dek-duan!

„**P**io la 12a estu proklamita ‘justulo inter la nacioj’, ĉar li estis la gvidanta persono, kiu pli ol ĉiuj engaĝiĝis dum la dua mondmilito por savi judojn persekutatajn de Hitler. Do malpravas kiuj, de Cornwell ĝis Hitchens, markas papon Pacelli [paĉelli] kiel simpatiantan al nazia Germanio, sekve kontraŭjudan.” Jen tezo de Gary L. Krupp, usona judo, prezidanto de la fondaĵo *Pave the Way* (Preparu la vojon) el Nov-Jorko (kiu en 2005 organizis la plej multnombrian renkontiĝon de rabenoj kun papo Johano Paŭlo la 2a). Li alportis antaŭe nekonatajn sciigojn pri la rolo de Pio la 12a por forsavi arojn da hebreej. Ekzemple tiun, laŭ kiu la ĉefpontifiko fuĝigis homojn, per plurmiloj da vizitoj, al la respubliko Domingo.

Pri ĉi tio oni parolis en septembro pasinta, en Romo, en vilao Salvati, dum kunveno kunvokita de la menciita fondaĵo, kaj en kiu partoprenis elstaraj intelektuloj, inter kiuj Martin Gilbert, biografo de Churchill kaj aŭtoro de *La Justuloj. La nekonataj herooj de la holokaŭsto*, kaj diversaj vaticanistoj.

Doktoro Krupp, kiu laboras kiel sendependa esploristo, klarigis kiel hazarde li trovis dokumentojn kaj taglibrojn kaj personajn memoraĵojn ktp, kaj fine sentis moralan devon ŝanĝi sian opinion, kaj proponi plurdetale revizion kontraŭ la ĝenerala konvinko. Finan baton kontraŭ sia antaŭjuĝo al Pio la 12a li ricevis el la malkovro de dokumentoj kaj atestaĵoj pri la jeno:

La nuncio en Domingo, Joha-

no Perrofino, kiu naŭdek-kvin-jara ankoraŭ vivas en Francio, ricevis ĉiun sesan monaton ĉifritan telegramon rekte de la papo, por ke li petu kaj akiru de la registaro de tiu lando 800 vizitojn por judoj, kiuj intertempe el la „naziaj” zonoj forfuĝis al Portugalio, Hispanio kaj alilanden. Rafael Leóndas Trujillo [truhijjo], tiama diktatoro de Domingo, plenumis la dezirojn de la papo ok ĝis dek fojojn dum la ses-jara milito, kontribuante tiel al savo de plurmiloj da judoj, kiuj poste el tiu loko elmigris al aliaj landoj.

Nun Krupp estas serĉanta, kun siaj helpantoj, pliajn dokumentojn, ĉar eblas, ke similaj aferoj realiĝis ĉe aliaj sud-amerikaj registaroj. Eblas, ke tiaj dokumentoj malmultas, ĉar la prudenta sekreteco altrudis ne lasi spurojn, eĉ en vaticanaj arkivoj estas eble, ke ne plu ekzistas tiaj spuroj, ĉar la nazioj minace „promenadis” en Romo sur la Placo de Sankta Petro. Sed eblas, ke en kancelarioj de malgrandaj kaj grandaj landoj kuŝas pluaj dokumentoj. Krupp informis, ke tiu papo laŭ informoj de J. Perrofino miris, dolore miregis, pri la nehelpo de la aliancaj registaroj.

La fina celo de Krupp kaj de la fondaĵo *Pave the Way* estas ankaŭ sciigi la malkaŝitajn pruvojn pri la efika agado de la papo al judaj medioj. „Kiel judo, mi povas ankaŭ diri, ke en la agado por savadi judojn, Pio la 12a faris konkrete pli ol ĉiuj politikaj kaj religiaj gvidantoj kune. Mi kredas ke la judoj, se informitaj, pretos pagi sian ŝuldon de dankemo al tiu papo.”

Armando ZECCHIN

KONKURSOJ

Arta futuro

Tri mondfamaj arkitektoj partoprenis konkurson por la projekto de nova multflanka kultura centro en la litova ĉefurbo Vilnius. La centro fariĝus filio de novjorka modern-arta muzeo Guggenheim kaj sankt-peterburga Ermitaĝo. En ĝi lokiĝus ne nur ekspozicioj de tiuj muzeoj, sed ankaŭ bildarta centro de Jonas Mekas, litovdevena usona filmkreanto, artisto ofte nomata „baptopatro de usona avangarda kino”, kulturcentro de litovdevenaj judoj, junulara edukcentro, kaj du kinejoj de nekomercaj filmoj.

Ĉiuj tri konkursantoj famiĝis per diversaj projektoj. Daniel Libeskind konceptis multajn dekojn da arkitekturaj muzeoj, kulturaj centroj, komercaj kaj loĝaj konstruaĵoj en norda Ameriko, Azio kaj okcidenta Eŭropo. Unu el liaj lastaj plej famaj verkoj estas la turo de libereco en Novjorko, konstruata sur la loko de la detruitaj nubskrapuloj. Kun Libeskind konkursis unu el la plej modaj en la mondo irakdevena

brita arkitekto Zaha Hadid kaj la fama italo Massimiliano Fuksas.

Tiu ĉi konkurso de arkitekturaj projektoj estis organizita de fonduso Solomon R. Guggenheim kaj ŝtata muzeo Ermitaĝo. Ilia celo estis pritaksi arkitekturajn, ekonomiajn kaj kulturajn eblojn por fondo de la nova muzeo en Vilnius. La plej ĉefaj postuloj – la kosto de la projekto ne devus superi 65-70 milionojn da usonaj dolaroj kaj la areo – ne pli ol 15 000 kvadratajn metrojn. La reprezentantoj de la centro de bildarto de J. Mekas, kiu iniciatis la konkurson, ne dubas, ke por Vilnius, kiu sekvontjare fariĝos ĉefurbo de eŭropa kulturo, nova muzeo povus esti serioza instigo por allogi spertulojn pri moderna arto, kino kaj arkitekturo.

Internacia komisiono decidis, ke la plej bona projekto estas tiu de la brita arkitekto Z. Hadid, premiito de la plej prestiĝa arkitekta premio Pritzker. Ŝiaj plej famaj verkoj estas la transporta muzeo en Glasgovo (Britio), la centro *Aquatics* por la Olimpiaj Ludoj de 2012 en Londono, la muzeo de artoj de la 21a jarcento en Romo, la muzeo Guggenheim en Tajvano.

Anticipaj kalkuloj montris, ke realigo de la projekto kostus ĉirkaŭ 118 milionojn da usonaj dolaroj. Tamen ĉefministro de litova registaro Gediminas Kirkilas diris, ke la ŝtato povus trovi nur ĉirkaŭ 10-15 procentojn de la bezonata sumo. Alia parto devus veni de la urba municipo, privataj mecencatoj, kaj helpo de EU-fondusoj. La muzeo devus malfermiĝi en la jaro 2013.

LAST




La centro fariĝus filio de novjorka modern-arta muzeo Guggenheim



Vidaĵoj de la futura muzeo en Vilnius fare de arkitekto Zaha Hadid.



Kvazaŭaŭtobiografia rakonto tre maltrankviliga



Sendube multaj legantoj memoras la periodon inter la fino de la dua mondmilito kaj la disfalo de la komunistaj reĝimoj. Sed verŝajne por pli junaj legantoj tio jam estas parto de la antikva epoko, pri kies detaloj ili malmulton scias.

La enhavo de ĉi tiu verko pritemas la vivon en Transilvanio dum tiu periodo. Por kompreni ĝin, necesas konigi al si iom el la socia fono de Transilvanio.

Transilvanio estas teritorio, aparteninta jen al Hungario, jen al Rumanio. En 1947, ĝi estis plene transdonita al Rumanio, kvankam plu loĝis en ĝi multaj hungaroj. Dum la fino de la dua mondmilito la rusa armeo brutale konkeris Rumanion, kaj la komunista movado sukcesis establi Rumanion kiel komunistan reĝimon, sub la jugo de Sovetio, kies diktatoro estis Stalino.

Post la morto de Stalino (1953) kaj lia denuncigo en 1956 okazis ribeloj en Hungario, kiujn subpremis la sovetia militistaro. Sovetio plu direktis la sacion

en la subjugita komunisma Rumanio.

En 1974 Ceaușescu [ĉaŭŝesku] iĝis plenpotenca diktatoro de Rumanio. Li sendependigis Rumanion de Sovetio kaj daŭrigis stalinisman reĝistemon tre severan, ĝis kiam, en 1989, kontraŭkomunista ribelo en Rumanio ekzekutis lin. Konsekvence la socia situacio en Transilvanio estis kaosa dum tre longa periodo.

La aŭtoro Stephan Lang naskiĝis en Transilvanio en 1945. En 1975, do tuj post kiam Ceaușescu firme establis sin kiel aŭtokratan diktatoron, li fuĝis el Rumanio al Nederlando. Ĉu la rakonto en la verko prezentas romanigitan rakonton pri parto de la vivo de la aŭtoro, ne estas dirite.

La scenejo de la intrigo estas malgranda transilvania vilaĝo, nelonge post la ekzekuto de Ceaușescu en 1989. Viro, kromnomata la talpoĉasisto, kiu fuĝis el Rumanio en 1975, revenas al la vilaĝo por lastfoje renkonti sian mortantan patrinon. Ŝi kuŝas en lito, en sia domo, vartate kaj flegate de fratino de la talpoĉasisto. Li malvolis pli frue viziti sian iaman hejmlandon, kaj nun iom nevolonte tion faras. Li revenas, parte por repaciĝi kun sia mortanta patrino, kaj parte por trovi, kia nun estas la vilaĝo, kiu estis la loko de tiom da teruraĵoj.

Naŭzas lin flegi la mortantan patrinon, kiu perdis ĉian kapablon regi siajn fekadon kaj urinadon kaj kiu alterne konscias kaj nekonscias. Tamen li volas klarigon pri eventoj en la vilaĝo dum liaj infanojaroj; pri la demando, kiu estis lia biologia patro; kaj pri la spertoj de lia patrino, fare de la rusaj soldatoj.

Ŝi rakontas, iom post iom, siajn spertojn, kaj la sekreton pri lia biologia patro. Tre detale rakontas la mortanta pa-



Stephan Lang

trino pri la propraj spertoj kaj la eventoj okazintaj. Inter epizodoj de tiu rakontado, la vizitanta talpoĉasisto traaŭtomobilas la vilaĝon, por vidi, kiel ĝi intertempe ŝanĝiĝis. Li ne estas tre bonvena pro sia hungareco. Plejparte la rumanoj en la vilaĝo kulpigas la hungarojn, pro kies ribelo kontraŭ Sovetio la rusaj militistoj tiom fie traktis la transilvanianojn.

Ne anticipu trovi trankviligajn eventojn aŭ pensojn en ĉi tiu verko, por mildigi la ŝokon, kiun kaŭzas la raporto pri la vivo tiama. Ja anticipu kunsenti la naŭzon kaj la maltrankvilegon, kaj, fininte la legadon, demeti la libron kun malespero en la koro.

Donald BROADRIBB

Stephan Lang: *La talpoĉasisto*. Tr. Gerrit Berveling. Eld. FEL, Antverpeno. 127 paĝoj kudritaj kaj tre fortike gluitaj. ISBN: 978 90 7706635 3.

Prezo ĉe FEL: 19,49 eŭroj + afranko

Bizara rakonto fantazia

En la jaro 1838 aperis la svedlingva originalo de ĉi tiu bizara rakonto, verkita de la sama aŭtoro, kiel *Ormuzdo kaj Arimano*. Temas pri viro, kiu trovas tre kuriozan aferon: oni promesas pagi gineon post la veturo al kiu ajn, kiu akceptas senpagan bileton por veturo en certa ĉaro. La viro akceptas kaj suferas malfacile kompreneblajn spertojn. Post pluraj tiaj veturoj li devas plenumi neakcepteblan agon, alie li pereos.


La rakonto havas karakteron de misternovelo, en kiu rolas pseŭdojapanlingvaĵoj. Mi ne volas diri pri la intrigo pli, ol ke ĝi estas nekredeble bizara.

La stilo estas klara kaj bona, la traduko estas egale klara kaj bona. Manpleno da komposteraroj malmulte ĝenas. La libro plaĉe aspektas.

Al mi mem plaĉas la rakonto. Ĉies bongustaĵo ĝi verŝajne ne estas. Sed valora kontribuaĵo al nia literaturo ĝi estas. La tradukinton/eldoninton mi gratulas.

Donald BROADRIBB

Carl Jonas Love Almqvist: *La palaco*. Tradukis Gunnar Gällmo. Eldonis Gunnar Gällmo per www.lulu.com. 70 paĝoj gluitaj. ISBN ne indikita.



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagyí.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ aŭfranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

La aŭstra organizaĵo pri protekto de la naturmedio *Global 2000* prezentis alarman prognozon pri la klimato en Tirolo ĝis 2100. La esploro montras, ke en la alpa regiono la sekvoj de plivarmiĝo intense aperas. La Alpoj reagis tre senteme al la tutmonda klimatsanĝiĝo kaj tial povus esti traktataj kiel „sistemo de frua averto”.

Laŭ la prognozo en la sekvaj jardekoj la someroj kaj aŭtunoj estos je tri gradoj pli varmaj. Pro neevitebla klimatsanĝiĝo ĝis la fino de la jarcento oni timas temperaturleviĝon de ĝis kvin gradoj. Tio konformas precize al la diferenco en la temperaturo ekde la lasta glaci-epoko ĝis nun.

La someroj estos pli sekaj, la vintroj tamen riĉaj je precipitaĵoj. Je alto sub 2000 m ne neĝos, sed nur pluvos. En la vintro pluvos ĝis 30 procentojn pli ol nun. Ĝis la fino de la jarcento ĉiuj glaciejoj degelos en Aŭstrio. Inundoj kaj lavangoj en la alta montaro okazos pli ofte.

Nek homoj, nek naturo povas adaptiĝi dum mallonga tempo al la klimatsanĝiĝo. La efikoj al la vivo kaj naturo estos grandskalaj: aparte sanproblemoj minacos infanojn kaj pli aĝajn homojn, multaj best- kaj plant-specioj ne postvivos la temperaturleviĝon. Tial la pli altaj temperaturoj kaŭzos la for-



Mayrhofen en la valo Zillertal, Tirolo. Ĉu post 100 jaroj sub la akvo?

morton de neĝleporo kaj marmoto. Ĉiuj ĉi malbonaj evoluoj postulas urĝan intervenon de la ŝtato.

Leĝo urĝe bezonata

La plivarmiĝo havos efikon ankaŭ al la energiproduktado: la akvoenergiaj centraloj, kiuj dependas de akvo, havos gravajn problemojn. Akvo minacas malmultiĝi pro la longaj sekaj somerperiodoj. Do, se oni ne antaŭzorgos, la ruiniĝo de la energia sistemo certe okazos.

La organizaĵo *Global 2000* postulas ampleksan leĝon pri la protekto de la klimato. Tiu lasta devas esti proklamita kiel grava ŝtatcelo. Por reduktado de la karbona dioksido oni devas malpliigi la rapidecon de la trafiko. Tial la organizaĵo pledas por ĝenerala limigo de la aŭtorapido je 80 kaj 110 km hore. Krome ĝi postulas, ke oni ĉesigu la subvenciojn por flugtrafiko, pliseverigu la konstru-regularon kaj estigu aldonajn verdajareojn.

Evgeni GEORGIEV



Belgio estas la plej „bonkondata” ŝtato rilate la recikligon de malplenaj piloj kaj baterioj. Pli ol 50 % de la venditaj ekzempleroj post iom da tempo estas reportitaj al la bu-

RECIKLIGO

Belgio pintas

tikoj por recikligo. Tion ĵus klarigis la belga *Fonds Ophaling Batterijen* (Fonduso por reakirado de baterioj). „La celo de Eŭropa Unio (EU) estas, ke ekde la jaro 2012 unu kvarono de ĉiuj piloj estu reportita. Belgio jam do multe superas tiun normon”, diras Katrien Busselot el la fonduso. Ĉu do la normo de EU estas tro malstrikta? „Ne,” plukomentas Busselot, „tiu minimumo de 25 % validas por ĉiuj ŝtatoj de EU, sed ne ĉie ekzistas la samaj kutimoj pri disdivido de la

hejma rubo. En iuj ŝtatoj eĉ ne 10 % estas reportitaj. Por ili do 25 % estas bona celo.” La fonduso komencis kolekti pilojn kaj bateriojn en la jaro 1996, kaj nun en ĉiu butikoj de la lando videblas ujoj por enmeti ilin.

La uzo de reŝargeblaj piloj estus eĉ pli bona, ol la reportado de malplenaj ekzempleroj, sed pri tio la statistiko nenion klarigas.

Paŭl PEERAERTS

USONO

Ohiaj ŝtataj Hipokaŝtanoj

La interkolegiaj sportaj ludantoj kaj teamoj de Ohia Ŝtata Universitato (OŜU) estas nomataj *Buckeye* [bakaj], laŭ la ŝtata arbo, la amerika hipokaŝtano, kaj ili partoprenas en la parto 1 de la Nacia Kolegia Atleta Asocio en ĉiuj sportoj kaj la Konferenco de la Granda Deko en la plimulto de la sportoj. (La vira hokea programo konkuras en la Centra Kolegia Hokea Asocio kaj la virina hokea programo konkuras en la Okcidenta Kolegia Hokea Asocio). La koloroj de la universitato estas skarlato kaj grizo. La talismano de OŜU estas Brutus Buckeye [Bakaj].

Ohia Ŝtata Universitato estas unu el nur tri universitatoj (la aliaj estas la universitato de Miĉigano kaj la universitato de Kalifornio en Berkelio), kiuj gajnis ĉampionecon de la Nacia Kolegia Atleta Asocio en basbalo, korbopilko kaj usona futbalo. Ohia Ŝtata Universitato gajnis ankaŭ naciajn ĉampionecon en vira naĝado kaj plonĝado, vira subĉiela

individua atletismo, vira golfo, vira gimnastiko, du-seksa skermado kaj sinkrona naĝado. Ekde la komenco de la Pokalo de la Direktoroj pri Atletismo, Ohia Ŝtata Universitato finiĝis en la supra 25o ĉiun jaron, inkluzivante finiĝojn en la supra seso en tri el la lastaj kvin jaroj. Dum la akademia jaro 2005-2006 Ohia Ŝtata Universitato fariĝis la unua teamo en la Konferenco de la Granda Deko, kiu gajnis la konferencan ĉampionecon en usona futbalo, vira korbopilko kaj virina korbopilko en la sama sezono. Ili ripetis ĉi tiun atingon dum la sezono 2006-2007, kiu inkluzivis korbopilkan ludon de la 25a de februaro 2007, kiam la Hipokaŝtanoj venkis la Melojn de la Universitato de Viskonsino – la unua korbopilka ludo en la Konferenco de la Granda Deko en kiu la unua-ranga teamo kaj la dua-ranga teamo ludis unu kontraŭ la alia.

Elstaraj sportaj figuroj, kiuj estis studentoj-atletoj ĉe Ohia Ŝtata Univer-



La svingado de la universitata flago antaŭ ĉiu ludo interne de la stadiono.

sitato, inkluzivas Jesse Owens [Ĝesi Oŭenz] („La hipokaŝtana kuglo”; individua atletismo), John Havlicek, Jerry Lucas kaj Katie Smith (korbopilko), Frank Howard (basbalo), Jack Nicklaus (golfo) kaj Chic Harley, Les Horvath, Vic Janowić, „Hopalong” Cassaday, Archie Griffin, Eddy George kaj Troy Smith. Trejnistoj de OŜU, kiuj estas honorigitaj en la Halo de Famo inkluzivas Paul Brown kaj Woody Hayes por usona futbalo, Fred Taylor por korbopilko, Larry Snyder por subĉiela individua atletismo kaj Mike Peppe por naĝado kaj plonĝado.

Barry FRIEDMAN



La usonfutbala stadiono de la Ohia Ŝtata Universitato senhome.



La vorto „Ohio” skribita sur la stadiona kampo de la universitata muzikistaro.

anoncetoj

La Verda Stelo, <http://tetrapentos.over-blog.com/> enhavas 3 partojn: 1) Tetrapentos, 2) Stelo, 3) La Ora Stelo. La tria parto estas tradukita al pluraj lingvoj; mi emus doni pli da tradukoj al tiu parto. Se tio interesas vin, iru al <http://tetrapentos.over-blog.com/article-16071723.html>

Se vi tradukas tiun paĝon al via nacilingvo kaj sendas tiun tradukon al mi, mi pagas vin sendante al vi unu ekzemplaron de La Ora Stelo (aŭ Verda Stelo, se vi elektas la ludon, kiu enhavas ĉiujn pecojn verdajn). Antaŭ ol komenci tradukon, bonvolu skribi al jacques.ferroul@laposte.net por scii, ĉu neniu jam komencis traduki.

Vizitu Iperity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 1250 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provexemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6587

LA GAZETO

MONDKULTURA SENDEPENDA ESPERANTISMA

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Jak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
lk@free.fr

INTER

Projekto de poŝtkartarto

por la 4-a volumo de nia jara libro
"KIOSKO DE LEVANTO – libera, skeptika, interkultura"

Temo: La vorto "inter",
siaj memstaraj formoj & kunmetaĵoj.
Formo: Teksto, desegnaĵo, grafikaĵo,
foto ktp. & kombinaĵoj el tiuj.
Formato: Ordinara poŝtkarto
(DIN 6, 105 x 148 mm),
unu aŭ ambaŭflanke prilaborita
Ĉefe Esperanto, ĉe aliaj lingvoj laŭeble
kun taŭga traduko-klarigo.
Lingvoj: Nur nigra-blanka, laŭeble altkontrasta.
Koloroj: Maksimume 4 poŝtkartoj ĉiuaŭtore.
Nombro: Nur „normal“-poŝta, ne elektronika.
Sendomaniero: 2009-septembro-30
Limdato:

Ĉiuj estas amike invitataj!

Adreso de alsendo:

NULA HORO

AP 270 – C/Esperanto, 3

03170 Rojales (Alicante)

Hispanio



**enciklopedieto
kun informoj kiel
telefoni el kaj al
eksterlando**

POŜKALENDARO

- kun spaco por fari notojn
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

ENCIKLOPEDIETO

- kun ŝtatoj de l'mondo
- kun ĉefurboj, loĝantoj ktp.
- kaj multe pli

La Jaro 2009

via poŝamiko dum la tuta jaro 2009



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen
www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto (vidu liston kaj prezojn en p.4)

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun
por la 3 venontaj jaroj (-5%) aŭ por la 5 venontaj jaroj (-10%)